Internacia Komunista Esperantista Kolektivo
IKEK, BCM Box 8932, Londono, GB-WC1N 3XX, Britio. www.ikek.org

La kapitalismo regas nun …

En sia senĉesa strebo por profito, la socia sistemo de kapitalo minacas la ekziston de la homaro. Kapitalismo sinonimas militon, polucion, ekspluatadon kaj krizon. Dum ĝi parolas pri demokratio, ĝi estas kerne maldemokratia. Racia, justa, paca, daŭrigebla kapitalismo estas iluzio.

Bazita je la ekonomia ekspluatado, la kapitalo daŭre kreas klason de laboristoj, la proletaro - tiuj, kiuj vivas per salajroj. Nuntempe, la laborista klaso jam fariĝis la plimulto de la homaro – la 'dormanta giganto'.

Jes, pli bona mondo eblas …

La senklasa komunismo – socio sen militoj, ekspluatado, mono, ŝtatoj, nacioj – atingeblas nur per klasbatalo, per lukto por venko de demokratio, per periodo de la regado de la laborista klaso: la mondvasta socialismo,

Nur per klasbatalo …

La nura socia forto kapabla detrui kaj pozitive preteri la kapitalismon estas la laborista klaso kiun ĝi kreas. Tiu klaso devas sin organizi en mondvasta komunista partio – Komunista Internacio – por kunordigi la lukton. Sukcesa lukto postulas la plej proksiman unuecon de la proletoj de la mondo.

Miloj da lingvoj apartigas nian klason. La internacia uzo de la lingvoj de kelkaj imperiismaj ŝtatoj neeviteble privilegias kaj diskriminacias.

Lingvo demokrata kaj praktika …

Esperanto estas racie elpensita internacia lingvo, kiu ne apartenas al iu ajn ŝtato aŭ nacio, demokrata kaj praktika rimedo en la lukto por monda unueco de nia klaso. Demokrata, ĉar ĝi ne privilegias. Praktika, ĉar ĝi estas multe pli facile lernebla ol naciaj lingvoj. Lernu Esperanton!

IKEK organizas komunistojn kiuj parolas la internacian lingvon Esperanto kaj utiligas ĝin por la klasbatalo. Ni celas helpi al la internaciaj rilatoj de la komunistaj kaj klasbatalantaj partioj kaj de la laborista movado.

Proletoj de ĉiuj landoj, unuigu vin!

Internacia Komunista Esperantista Kolektivo
IKEK, BCM Box 8932, Londono, GB-WC1N 3XX, Britio. www.ikek.org

La kapitalismo regas nun ...

En sia senchesa strebo por profito, la socia sistemo de kapitalo minacas la ekziston de la homaro. Kapitalismo sinonimas militon, polucion, ekspluatadon kaj krizon. Dum ghi parolas pri demokratio, ghi estas kerne maldemokratia. Racia, justa, paca, dawrigebla kapitalismo estas iluzio.

Bazita je la ekonomia ekspluatado, la kapitalo dawre kreas klason de laboristoj, la proletaro - tiuj, kiuj vivas per salajroj. Nuntempe, la laborista klaso jam farighis la plimulto de la homaro – la 'dormanta giganto'.

Jes, pli bona mondo eblas ...

La senklasa komunismo – socio sen militoj, ekspluatado, mono, shtatoj, nacioj – atingeblas nur per klasbatalo, per lukto por venko de demokratio, per periodo de la regado de la laborista klaso: la mondvasta socialismo,

Nur per klasbatalo ...

La nura socia forto kapabla detrui kaj pozitive preteri la kapitalismon estas la laborista klaso kiun ghi kreas. Tiu klaso devas sin organizi en mondvasta komunista partio – Komunista Internacio – por kunordigi la lukton. Sukcesa lukto postulas la plej proksiman unuecon de la proletoj de la mondo.

Miloj da lingvoj apartigas nian klason. La internacia uzo de la lingvoj de kelkaj imperiismaj shtatoj neeviteble privilegias kaj diskriminacias.

Lingvo demokrata kaj praktika ...

Esperanto estas racie elpensita internacia lingvo, kiu ne apartenas al iu ajn shtato aw nacio, demokrata kaj praktika rimedo en la lukto por monda unueco de nia klaso. Demokrata, char ghi ne privilegias. Praktika, char ghi estas multe pli facile lernebla ol naciaj lingvoj. Lernu Esperanton!

IKEK organizas komunistojn kiuj parolas la internacian lingvon Esperanto kaj utiligas ghin por la klasbatalo. Ni celas helpi al la internaciaj rilatoj de la komunistaj kaj klasbatalantaj partioj kaj de la laborista movado.

Proletoj de chiuj landoj, unuigu vin!